BEL informas

n-ro 21/2014

la 12an de septembro 2014 | *12 de setembro de 2014*

Publikigita raporto pri la Kongresa Ago-tago en Bonaero

Publicado relatório do Ago-tago no Congresso de Buenos Aires

Estis tre sukcesa ankaŭ por Bonaero la Gazetara Kampanjo pri la Universala Kongreso (KUKO). Spektu filmetan raporton kaj vizitu nian paĝon http://www.gazetaro.org por konatiĝi kun la kampanjo, vidi ĝiajn rezultojn, kaj espereble partopreni ĝin en la okazo de la venontaj kongresoj.

UEA/BEL

Foi um sucesso, também em Buenos Aires, a Campanha de Imprensa sobre o Congresso Mundial (KUKO). Assista o relatório em vídeo e visite nossa página http://www.gazetaro.org para conhecer a campanha, ver seus resultados e se possível participar dela nos próximos congressos.

UEA/BEL

BEJO akiras spacon por Esperanto en poeta konkurso

BEJO consegue espaço para o Esperanto em concurso de poetas

Kontakte kun Eldonejo Vivara, kiu originale aperigis konkurson por novaj poetoj nur en la portugala, BEJO sukcesis akiri spacon por Esperanto en tiu konkurso. La konkurso originale akceptis poemojn grandajn ĝis du paĝoj kaj poste, laŭ propono de BEJO, ankaŭ poemojn dulingvajn Esperanto-portugala, kondiĉe, ke la tuto ne pli grandus ol du paĝoj. Limdato por partopreno jam pasis (la 5-a de septembro), sed BEJO anoncis vaste en diskutolistoj kaj en fejsbuko ĝustatempe. Pluraj poetoj kontaktis nin, konfirmante partoprenon. Ni deziras al ili sukceson!

Legu pli jenen: http://www.cnnp.com.br/.

BEJO

Em contato com a Editora Vivara, que abriu concurso de poetas apenas em português, a BEJO conseguiu um espaço para o Esperanto neste concurso. O concurso a princípio aceitava poemas com até duas páginas de tamanho e depois, após proposta da BEJO, também poemas bilíngues Esperanto-português, com a condição de que o todo não excedesse duas páginas. A data limite para participar já passou (5/9), mas a BEJO divulgou a tempo largamente em listas de discussão e no facebook. Vários poetas nos contactaram, confirmando participação. Desejamos sucesso!

Leia mais em: http://www.cnnp.com.br/.

BEJO

Eldonejo Taverno lanĉas novan aŭdlibron

Editora Taverno lança novo áudio-livro

Cândido Ruiz - Editor
www.taberna.aolimiar.com.br

La teamo de la Eldonejo Taverno informas pri sia nova aŭdlibro. Temas pri rakonto, parto de la antologia verkaro "Malutopio", kiu titoliĝas "Iluminiĝo". Ĝi estis verkita de la brazilano Paŭlo Fodra, esperantigita de Francisco Stefano Wechsler kaj laŭtlegita de Luis Jorge Santos-Morales.

Jen ceteraj informoj pri ĝi:
http://taberna.aolimiar.com.br/portfolio-type/iluminigo/

Cândido Ruiz/BEL Informas

A equipe da Editora Taverno informa sobre seu novo audio-livro. Trata-se de um conto, parte da antologia "Malutopio" (“Distopia)”, que se entitula "Iluminiĝo" (“Iluminação”). Foi escrito pelo brasileiro Paulo Fodra, traduzido para o Esperanto por Francisco Stefano Wechsler e registrado em voz por Luis Jorge Santos-Morales.

Mais informações aqui:
http://taberna.aolimiar.com.br/portfolio-type/iluminigo/

Cândido Ruiz/BEL Informas

Aperis en la loka gazeto CNL: São Miguel Paulista parolas Esperanton antaŭ 65 jaroj

Deu no jornal local CLN: São Miguel Paulista fala Esperanto há 65 anos

“São Miguel Paulista, kvartalo de orienta zono de San-Paŭlo, havas kiel unu el siaj unikaĵoj la Esperantan Klubon Zamenhof. Klubo, kiu instruas Esperanton senpage ekde 1949 kaj kiu lokiĝas en la kvartala centro. Fondis la institucion Osvaldo Pires de Holanda kaj naŭ kolegoj ankaŭ esperantistaj”.

“São Miguel Paulista, bairro da zona leste de São Paulo, tem como uma de suas peculiaridades o Esperanta Klubo Zamenhof (Clube de Esperanto Zamenhof em Esperanto). Um clube que ensina Esperanto gratuitamente desde 1949 e que fica no centro do bairro. A instituição foi fundada

por Osvaldo Pires de Holanda e nove colegas também esperantistas".

Legu plie jenen (en la portugala):
http://www.itaimpaulista.com.br/portal/index.php?secao=news&subsecao=16&id_noticia=2603

BEL Informas

Leia mais aqui:
http://www.itaimpaulista.com.br/portal/index.php?secao=news&subsecao=16&id_noticia=2603

BEL Informas

21/09 - RENKONTIĜO DE ESPERANTO EN TAGUATINGA

21/09 - ENCONTRO DE ESPERANTO EM TAGUATINGA

La 21-an de septembro 2014, de la 10-a ĝis la 12-a matene, ĉe la aŭditorio de la Administrejo de Taguatinga, Federacia Distrikto, okazos la 17-a Esperanto-Renkontiĝo de Taguatinga, kies temo estas **Esperanto kaj Framasonismo**.

Nia samideano Evandro Ferreira de Avellar, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, prelegos pri la temo de la evento. Estos amuzaj aranĝoj, inkluzive la muzikgrupo Nova Erao kaj la gitaristo Fernando Sardinha sinprezentos.

No dia 21 de setembro próximo, de 10 a 12 horas da manhã, no auditório da Administração de Taguatinga, Distrito Federal, será realizado o 17º Encontro de Esperanto de Taguatinga, com o tema **Esperanto e Maçonaria**.

Evandro Ferreira de Avellar, presidente da Liga Brasileira de Esperanto, falará sobre o tema do evento. Haverá ainda divertidas atrações, inclusive a apresentação do grupo musical Nova Era e do violonista Fernando Sardinha.

Taguatinga Esperanto-Klubo (TEK) kaj la Framasona Loĝio Lazaro Luiz Zamenhof organizas tiun renkontiĝon.

TEK

O Taguatinga Esperanto-Klubo (TEK) e a Loja Maçônica Lázaro Luiz Zamenhof são as entidades organizadoras do Encontro.

TEK

Atenton! BEL Informas volas scii: kiuj estas niaj venontaj eventoj?

Sennombro da eventoj okazas en Brazilo dum la tuta jaro. Parto de la misio de **Brazila Esperanto-Ligo** estas ilin disvastigi al ĉiuj, kaj ***BEL Informas*** estas komunikservo je la dispono de nia tuta komunumo. Sendu al ni novaĵojn pri eventoj en via regiono - miloj da homoj scios pri ili kaj igos ilin sukcesaj pere de nia ***BEL Informas***

Ni atendas viajn informojn!

Klaku ĉi tie por scii kiel sendi viajn novaĵojn.

Teamo de BEL Informas

Atenção! O BEL Informas quer saber: quais são nossos próximos eventos?

São inúmeros os eventos de Esperanto no Brasil durante todo o ano. Uma das missões da **Liga Brasileira de Esperanto** é divulgá-los, e o ***BEL Informas*** é um serviço que está à disposição de toda a comunidade. Conte-nos de eventos em sua região - milhares poderão inteirar-se deles e garantir seu sucesso com nosso ***BEL Informas***

Estamos aguardando!

Clique aqui para saber como enviar suas novidades.

Equipe BEL Informas

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

BEL invitas: vizitu kaj ŝatu nian paĝon ĉe facebook!

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

BEL convida: visite e curta nossa página no face!

www.facebook.com/brazilaesperantoligo

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Malkovru en via BEL@Butiko

Unu ringo ilin regas - Interessante análise da obra de Tolkien em Esperanto, apenas R$ 10,56!

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/unu-ringo-ilin-regas.html

Descubra em sua BEL@Butiko

50-a BKE - Inscrição no 50º Congresso Brasileiro de Esperanto, janeiro de 2015, Rio de Janeiro. Diversas categorias!

http://belabutiko.esperanto.org.br/abonservo/index.php/congresso-e-eventos/50bke.html

Amdeklaro al Esperanto - Esta obra se divide em duas partes: a primeira destina-se àqueles que já falam o Esperanto, e a segunda, àqueles que estão finalizando o curso de Esperanto; apenas R$ 20,00!

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/amdeklaro-al-esperanto.html

Infanoj en la transmondo - Uma das mais graciosas edições em Esperanto de uma obra de Chico Xavier, por apenas R$ 15,00!

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/infanoj-en-la-transmondo.html

AL BEL-MEMBROJ: POR RICEVI 10%-AN RABATON, PETU VIAN RABAT-KODON ĈE LA ADRESO:

belabutiko@esperanto.org.br

Vizitu vian virtualan butikon:

AOS MEMBROS DA BEL: PARA TER DESCONTO DE 10% NA COMPRA DE LIVROS, SOLICITE SEU CÓDIGO JUNTO AO ENDEREÇO:

belabutiko@esperanto.org.br

Visite a sua loja virtual:

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos
belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto
Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Anna Lobo, Antonio Felix, Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emmanoel Lima, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Flávio Gomes, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Marcus Aurelius Farias, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu kontribuojn al bel.informas@gmail.com

Ricevu BEL Informas per via retadreso
Receba BEL Informas em seu email

www.esperanto.com.br/bel